

LEA/G - INFORMILO

(MAGAZINO)

Organ des Freien Esperanto-Bundes in deutschsprachigen Gebieten

Libera (Laborista) Esperanto-Asocio en germanlingvaj regionoj

Enhavante paĝojn de *La Socialisto*, organo de la Aŭstria Socialista Ligo Esperantista

Fondita (gegründet) 1956

Eldono nro.7

3-a jarkvarono 2004

Linguistische Großtat – zu wenig beachtet!

Es war einer der Träume der Menschen, die Sprachbarrieren niederzureißen, um sich durch Verständigung verstehen zu lernen. Ausgehend von dem Sprachentwurf L.L.Zamenhofs ist es gelungen, eine erfundene zu einer "wirklichen" Sprache zu machen, die sich vier Generationen nach ihrer Ingebrauchnahme in allen Lebenslagen bewährt hat. Es ist dazu unerheblich, dass Esperanto bislang nur aus idealistischen oder wissenschaftlichen Motiven erlernt und verwendet wird; für nationalistische und sprachpolitische Engstirnigkeit kann die Sprache nichts. Ebenso wenig für die mangelnde Einsicht derjenigen, die mit Recht auf Erhalt kultureller Vielfalt und Identität pochen und deshalb das Esperanto für den Gegner halten anstatt den besten Verbündeten. Denn die "Sprachbarrieren" sollen – bei einer modernen regionalen Identität in Europa – nicht mehr niedergelassen, sondern nur noch überbrückbar gemacht werden, und das in gerechter Weise für alle, mit der gleichen Anstrengung.

Dass Journalisten wie Herr Dr.Katscher (*in Wien – la red.*) das weder sachlich noch fachlich überschauen, kommt immer wieder vor. Ohne eigene praktische Erfahrung kann man eine Sprache eben nicht be-, geschweige denn ver-urteilen. Die „normative Kraft des (epochal gesehen: augenblicklichen!) Faktischen“ spricht für Englisch als Weltsprache. Wobei übersehen wird, dass trotz jahrzehntelanger Bemühungen und trotz der sprachlichen Verwandtschaft zum Deutschen die Erziehung zur Zweitsprache Englisch gescheitert ist.

(La artikolon skribis Dro.Rudolf Fischer*, matematikisto k. lingvisto; li estis membro de la Aŭstria Socialista Ligo Esperantista (ASLE). La filo de li – Dro. Heinz Fischer – estos la venonta federacia prezidento de Aŭstrio. – O.a. Artikel schrieb Dr. Rudolf Fischer, Mathematiker und Linguist. Bis zu seinem Ableben war er Esperanto-Anhänger und Mitglied der Österreichischen Sozialistischen Liga der Esperantisten. Sein Sohn Dr.Heinz Fischer ist der künftige Präsident von Österreich.)

>> Pli pri la faktoj vi povas legi sur paĝo 6.

Freunde in der ganzen Welt – eine Sprache!
Esperanto, international, neutral und – leicht erlernbar!

>> Die Abbildung rechts oben zeigt eine der neuesten Portomarken der Deutschen Post aus Anlass der EU-Erweiterung.

>> La bildo dekstre montras unu de la plej novaj eldonoj de postmarkoj de la Germana Poŝto okaze de plivastigo de la Eŭropa Unio.



Novajo el la Eŭropa Unio

Jaŭdon, la 1an de aprilo, 2004, en la tagordo de la parlamento oni proponis voĉdonadon pri la *Informo pri la tradukoj en la 15 ĉefaj lingvoj de la Eŭropunia Parlamento. En la dokumento voĉdonita estis proponita etan ŝanĝon en la nuna traduksistemo uzata en la parlamento kun la celo, garantii la multlingveco kaj lingva egaleco ene de unu el la plej gravaj eŭropuniaj institucioj – la uzon de Esperanto kiel tradukan pontlingvon. La aŭtoro de la propono, la itala deputito Gianfranko Dell'Alba serioze proponis, ke la eŭropunia parlamento studu la eblecon uzi Esperanton kiel la pontlingvo por tradukado de siaj dokumentoj.*

(el interret' KHIK)

Übersetzung

Neuigkeit aus der Europa-Union. Donnerstag, am 1. April 2004 wurde in die Tagesordnung eingesetzt, eine Stimmabgabe über die Information zu Übersetzungen in 15 Chefsprachen des Parlaments vorzusehen. Dazu wurde eine kleine Änderung vorgeschlagen: Im jetzigen Übersetzungssystem soll die Chancengleichheit garantiert werden, was Esperanto als Brückensprache bietet. – Der Autor, der italienische Abgeordnete Gianfranko Dell'Alba schlug ernsthaft vor, die Europa-Union solle überdenken, Esperanto als Brückensprache zur Übersetzung von Dokumenten zu benutzen.

AFS

Eldonanto - Herausgeber

**Libera (laborista) Esperanto-Asocio
en germanlingvaj regionoj (LEA/G)
Freier Arbeitnehmer-Esperanto-Bund
in deutschsprachigen Gebieten**

Sekretario: Jiri PROSKOVEC

Heimbastr.10, (DE)44143 Dortmund

Tel: 0231/551211 ePost: Proskovec@yahoo.de

LEA/G-Konto: PROSKOVEC, Jiri, 4907 664 100

Norisbank Dortmund (BLZ 760 260 00)

**Respondeculo LEA/G-informilo: A.F.STEPHAN,
Renchener Str.47 (DE)77704 Oberkirch (Baden)**

Tel/Fax: 07802 - 90336

(Fakso nur eblas post antaŭanonco!)

Kunlaborantoj: K.H.Kersting, Essen

Hans Rodewig, Hannover (H.R.)

Redaktas la interretan MAGAZINon:

Gary MICKLE, Brüsseler Str.6 (DE)13353 Berlin

GMICKLE@NEXGO.DE

LEA/G-informilo aperas en ĉiu jarkvarono, se eblas

Abono: per donaco de 10 Euro

Membreco/Mitgliedschaft en LEA/G: 8 Euro

**jare/jährlich (inklusive liverado/Lieferung de la
Informilo kaj aliaj servoj/andere Dienste.**

Ligata: Aŭstria Socialista Ligo Esperantista, Vieno

Organo: La Socialisto Resp.: Reinhold Kammler

Karl-Beck-Gasse 3/2 A-1220 Wien

**Pri la enhavo de sia teksto respondecas la verkisto
mem. La redakcio havas la rajton, mallongigi
tekstojn kiam mankas spaco, aŭkaj ne akcepti ilin.**

Esperanto-Buchversand

D-ro. Wolfgang Schwanzer

Pfarrer-Seeger-Str.9, 55129 Mainz

Tel/Faks: 06136/46232 (vespere)

www.esperanto-buchversand.de

rete: wolfgang.schwanzer@esperanto.de

La ruĝa kruco signifas, ke vi, kara leganto, ankoraŭ ne pagis vian jarkotizon/abonon 2004!

Por plenumi la asociajn taskojn i.a. eldoni ĉiun informilon, varbi por Esperanto inter la laboristaro, prezenti S A T k.m.pli la financrespondeculo devas disponi pri la necesajn monrimedojn.

Nia kaso, do, tre ĝojos, kiam ankaŭ via kotizo/abonprezo 2004 alvenos.

Bv. pagi minimume 8 € al:

**Jiri PROSKOVEC, Dortmund, Konto 4907 664 700
Norisbank Dortmund 760 260 00) Dankon!**

Viaj kontribuoj por la informilo estas ĉiam bonvenaj. Ne hezitu alsendi tekstojn, bildojn k.a. al la redakcio Renchener Str.47, 77704 Oberkirch

Jen la fidelaj membroj, abonantoj kaj tiuj kiuj interŝanĝas E. gazetojn:

Herta Bellen, Dortmund; Willi kaj Margret Brandenburg, Telgte; Eberhard Brauser, Oranienbaum; Claude Bros, Chartres; Friedel Bues, Hannover; Helga Conzeth, Mettmann; Stella de Weerd, Stabroek; Günther Dörr, St.Egidien; Willi Ehlers, Berlin; Regina Friedrich, Bad Pymont; Jan Göldrich, Handlova; Rainer Haupt, Hamburg; Max Hocke, München; Hans Jankowski, Dortmund; Karl-Heinz Kersting, Essen; Franz Knöferl, Gerolsbach; Gary Mickle, Berlin; Karl-Ernst Paech, München; Jiri Proskovec, Dortmund; Manfred Retzlaff, Oelde; Gertrud Knorr, Gera; Hans Rodewig, Hannover; Michael Scherm, Weißenhom; Wolfgang Schwanzer, Mainz; Erich Seidemann, Gelnhausen; Albert k. Margot Stephan, Oberkirch; Andre Vaatz, Hamburg; Margot Weichmann, Dortmund; Josefo k. Irene Woznicka, Eschwege; ASLE, Vieno; *ĉu ni iun forgesis?* Ho jes: GEA Freiburg, Pastro Eichkorn, E.Ligo Berlin; Fritz-Hüser-Institut, Dortmund

Pluaj donacis krom la kotizo:

*Bellen..... 12 € Brandenburg 10 €
de Weerd 4 € Weichmann 34 €*

Nia informilo estas legata ankaŭ en eksterlandoj de...

Christian Baudé, Beauville; Guy Cavalier, Epinay; Erna Döring, Bazelo; Claude Gacond, La-Chaux-de-Fonds; Lucien Giloteaux, Croix; Vlada Hasala, Straznice; KAE-Informilo Sabadell; Gilbert Lebec, Sucy; Vilhelmo Lutermano, Durban; Cornelius McKown, USA; Pelle Persson, Farsta; Nikolao Gudskov, Moskovo; Radio Pekino; Radio Polonia; SAT, Paris; SAT-Amikaro, Paris; SAT-ana grupo en Sapporo; SATEB London; Jakwo Schram, Antverpeno; Prof. Ervin Fenyvesi, Budapest; Kiun ni forgesis?

Al ili ni liveras la informilon senkoste; parte ricevas lokan Esp.-revuon (LEA).

Mi legis intervjuon en la magazino Der Spiegel (dato: 25.08.03) kun la Bundestagspräsident Wolfgang THIERSE. Li deklaris ne miskomprenoble, ke la germana Socialdemokratio ankoraŭ havas grandan signifon.

Mi skribis je la 27 10 2003 al li kaj informis lin pri la ekzisto de la laborista Esperanto-movado. Mi ricevis respondon, ke ni rajtus traduke aperigi la tutan intervjuon en nia gazetaro, kiam La Spiegel interkonsentos.

Por la traduko oni bezonos multajn horojn kaj ĉio estu lingve kontrolata. Krom tio la tuta teksto estas tro granda por nia informilo. Pro tio mi rezignis.

AFS

nova dissendolisto por membroj kaj nemembroj de SAT:

Jam de kelkaj jaroj la retkonektitaj SAT-membroj disponas pri Yahoogroups-dissendolisto, kiu nomiĝas SAT-diskuto. Ankaŭ du frakcioj, la Liberecana kaj la Sennaciisma, havas delonge dissendolistojn. Ili fariĝis gravaj laborinstrumentoj. Nun ankaŭ la nove fonditaj kvira (t.e. por minoritataj seksaj orientiĝoj) frakcio kaj Poresperanta Fako (kiu okupiĝas pri Esperanto-informado) havas siajn listojn. Al la emancipaj agadoj aldoniĝas nun ankaŭ tiu de la nova IN-fako (virina fako) Emma. Ligita kun ĝi estas la dissendolisto SATINO, de kiu ĉi tiu informo venas. (GM)

Kio estas SATINO? Kiel aliĝi?

SATINO estas FEMINISMA DISSENDOLISTO, INFORMEJO kaj KULTUREJO de la IN-fako "EMMA" ĉe SAT POR ĈIUJ INOJ kaj FEMINISTAJ VIROJ en kaj ekster SAT. SATINO estas kaj-IN-movadema kaj-IN-informema.

SATINO kunlaboras kun ĉiuj esperantistoj, kiuj volas speciale engaĝi sin por la rajtoj de inoj en ĉiuj sferoj de la socio.

SATINO estas kontraŭ ĉia diskriminacio al la inoj, ankaŭ en Esperantio, ĝi estas kontraŭ la tradicia rolo de la inoj en la familio kaj en la laboro.

SATINO helpas rompi tabuojn kaj antaŭjuĝoj pri inoj.

SATINO estas pro neceso unuavice politika, sed tamen malferma por ĉiuj tipe inaj aferoj.

SATINO protestas ekzemple kontraŭ la belecfrenezon, la misuzon de inoj kiel nurajn seksobjektojn k.s. aferojn.

SATINO estas interŝanĝejo de ideoj por pli bone povi diskuti, kiel inoj devas agi en la E-organizoj kaj en la In-movadoj.

SATINO engaĝiĝas por la Internacia Tago de la Inoj en ĉiuj E-organizoj.

SATINO invitas vin viziti la kongresojn de SAT por tie diskuti kun inoj de SAT feministajn aferojn.

SATINO akceptas kaj subtenas feministajn virojn en siaj vicoj, ĉar nur kune ni estas fortaj.

Afable salutas vin Donjo! (Dorothea Kaiser) mia retadreso:

kaiser-altenburg@t-online.de

Inteligentaj inoj havas milionojn de malamikoj: la stultajn virojn. (Renate Schmidt, germana politikistino, nask. 1943)

KIEL ALIĜI AL SATINO

Se vi volas mem aliĝi, sendu malplenan retpoŝton al:

satino-subscribe@yahoogroups.com

Sed vi povas turni vin ankaŭ al la administrantino per retpoŝto, kaj tiam ŝi alligos vin.

Administrantino Dorothea Kaiser:
satino-owner@yahoogroups.com

La SATINO-hejmpaĝo:
<http://groups.yahoo.com/group/satino/>

Post membriĝo sendu viajn retmesaĝojn al:
satino@yahoogroups.com

Dorothea Kaiser

INA MAGIO

– omaĝe al ĉiu koleĝino en SATINO

Kaŝita, ĉia ina magio kaptas viron,
altiras lin per forto magneta de maicoj,
en li bruligas ĝi – ne malofte – la deziron,
lin metas, sen reago, en servon de kapricoj.

Okulta forto, fonto, raraĵo en vitrino,
nenio venkas la profundecon de la sorĉo,
l' ekziston de la volo potenca de la ino,
magio, la mistero, pasio. ĉarma torĉo.

Magio estas masko, vualo, amuleto,
oazo en dezerto, fetiĉo, talismano;
magio estas vervo en kor' de la poeto,
ĝi estas amrakonto, l' etoso de romano.

Magio estas ĉia virino, ŝia famo,
la gloro esti muzo en vira fantazio,
vivanta realaĵo, la ruĝo de la flamo,
l' aŭroro, luna sorĉo, la revo, l' utopio...

Georgo das Neves
Rio de Janeiro - Brazilo
poeta@infolink.com.br
<<mailto:poeta@infolink.com.br>>

aperis en SATINO

Prezenti Esperanton kaj SAT al la maldekstrularo

En 1980, junaj esperantistoj verkis kaj kolektis subskribojn sub deklaro, kiu poste ne ĉesis esti paroltemo inter esperantistoj. Ĝi nomiĝas la *Manifesto de Raŭmo*, ĉar oni iniciatis ĝin ĉe junulara Esperanto-kongreso en la finna urbo Rauma. Kvankam ne longa kaj ne profunde analiza, ĝi ekhavis grandan meriton per la fakto, ke ĝi maltabus la demandon pri tio, ĉu Esperanto havas realajn ŝancojn "finvenki". Ĝi eldiris, ke Esperanto sendepende de la necerta "fina venko" havas atentindan kulturalan valoron. "Ni kredas, ke la unua jarcento de Esperanto pruvis la taŭgecon de la lingvo por esprimi ĉion; meze de la 80-aj jaroj, komence de la dua jarcento, ni devos elmontri al la mondo ke ni kapablas ankaŭ diri *ion* – ion kulture originalan kaj internacie valoran."

Naskiĝis la ne plu malaperigebla koncepto **finvenkismo/raŭmismo**. Sed jam ses jardekojn pli frue okazis io simila. Komence de la 1920-aj jaroj, SAT komencis labori sur fundamento de "peresperanteco": ĝi celis servigi Esperanton al la klasbatalanta proletaro. Per tio SAT radikale deviis de la tiuepoka "poresperanteco", kiun oni tiam ankoraŭ ne titolis "finvenkismo". Ĝi deiris de la vojo, kiun sekvis "neŭtralaj" esperantistoj – antaŭĉambrumi ĉe burĝaj "gravuloj" kaj ellogi el ili komplezojn por Esperanto. SAT estis io monde unika: ne laŭlande strukturita "internacio", sed unueca *sennacieca* tutmonda asocio kun proleta membraro. Jam tiam ĝi havis ion "kulture originalan kaj internacie valoran" por diri. Ĝi asertis la neprecon de senpera interkontaktiĝo inter la ĉiulandaj proletoj kaj anticipis tion, kion oni poste nomis "baza demokratio" kaj "alternativa tutmondismo". Kaj la sennaciistoj – unu grava tendenco en SAT – pionire anticipis mondon, kies kultura diverseco estos "postetna" (por denove uzi terminon naskiĝintan en la lastaj jaroj). La komuna lingvo ebligis ĉi tiun politikan praktikon. La kunfondinto de SAT, E. Lanti diris: "La spirita kontaktiĝo inter la diverslandaj proletoj fakte okazas nur pere de poliglota intelektuloj. Tial la agado de

SAT, celanta kunigi, intimigi senpere la laborulojn tutmondajn, estas esence revolucia."

Ĉi tiu baza orientiĝo de SAT estas aktuala hodiaŭ, pli ol 80 jarojn post la fondo – kvankam parto de la nuna membraro emas modifi la laboristmovadan kaj klasbatalan terminologion kaj pli elstarigi la universalismajn kaj emancipajn orientiĝojn, kiujn oni ne povas senplue subordigi al la "klasbataleco".

Moderna celdifino por la maldekstra alo de esperantistoj povus esti: *per Esperanto helpi levi la ĝeneralan lingvan nivelon en la formiĝanta tutmonda kaj postnacia maldekstro*. Esperanto efektive jam de jarcento kontribuas al tio. Ĝia rolo estas kompreneble periferia – Esperanto estas nur unu el multaj rimedoj, kiuj peras inter lingvogrupoj. Ne povas esti alie, ĉar ĝi ja ne havas ŝancon oficialiĝi kaj iĝi ĉies dua lingvo en ĉi tiu mondo, kies mastroj mem volas stiri kaj mastrumi la regadon de fremdaj lingvoj ĉe siaj subuloj. Esperanto – ĉar sufiĉe facila por esti memstare kaj grandskale alproprigita de la popolamasoj – fuŝus unu elementon de la klasa regado. La regantoj de la mondo malbezonas Esperanton.

Sed eĉ en periferia rolo, Esperanto servis dum sia historio gravan aferon: la aŭtonoman lingvan kleriĝon de socie malfortaj homoj, kiuj mem elektis uzi ĝin.

- Ĝi ebligis al unulingvuloj, kiuj alie havus neniun ŝancon lerni duan lingvon, lerni almenaŭ unu tian, per kiu ili povis kontakti samsortanojn alilande. Precipe en SAT tiel okazis.
- Ĝi stimulis la lingvan intereson de homoj, kiuj ekkuraĝis lerni pliajn lingvojn. Ofte ĝi instigis homojn rezisti la lingvan modon kaj lerni pliajn malpli disvastigitajn lingvojn.
- Ĝi stimulis intereson pri la etiko de egalecaj lingvaj rilatoj.

Ne decas prisilenti, ke SAT ne havas hodiaŭ en la esperantista komunumo la

pezon, kiun ĝi iam havis. Kial? Laŭ ĉio antaŭe dirita, devus esti male, ĉu ne?

- La ĝenerala malfortiĝo de la (radikala) maldekstrularo trafis ankaŭ SAT.
- SAT ~~perdis multe pli da membroj~~ sub faŝismo kaj stalinismo, ol la "neŭtrala" Esperanto-movado. Ĝis la fino de la 80-aj jaroj ĝi estis malpermesita en Sovetunio kaj orienteŭropaj landoj de "reala socialismo".
- SAT post la Dua Mondmilito iĝis malpli radikala ol antaŭ la milito. Volante supervenki la antaŭmilitajn skismojn en la esperantistaro, ĝi laŭ mi trokompensis kaj tro brave evitis misagordojn en la rilato al UEA.
- TEJO superatutis SAT ĉe la mobilizo de la radikaliĝinta juna generacio post 1968. Tio fine tiris grandan parton de la tiama junularo en la UEA-sistemon anstataŭ al SAT. Intertempe, la ruĝa lako parte defalis desur la maldekstra-naciisma idearo, kiu ĉirkaŭ 1970 venkis en la medio de TEJO kaj UEA. Sed SAT ne aŭtomate profitas de tio. Ĝi devus iĝi la hejmo de pli aŭdaca idea ennovigado.

Nuntempe rimarkindas ĉe la uzantoj de Esperanto antagonismo inter la ĉiam ankoraŭ finvenkisma UEA-bazita "Esperanto-movado" kaj tiu mikronaciisma "Esperanto-komunumo", kiun unu frakcio de la raŭm-istoj provas konstitui en la konkreta formo de "Esperanta Civito". Mi esperas, ke SAT kunformulos ideojn, kiuj ebligu transcendi la konceptan antagonismon per io, kio havigos al la esperantistoj (tiuj, kiuj volos) veran funkcion en la "alternativ-tutmondisma" maldekstrularo. Kiugrade tio okazos, dependas kompreneble ankaŭ de ĝeneralaj politikaj evoluoj.

Mi ne povas saĝe respondi la demandojn de Lukaso¹ pri la perspektivo de kunlaboro inter SAT kaj liberecanaj grupoj. Tia kunlaboro dependas kaj de la grupoj kaj de la kapabloj kaj emoj de la esperantistoj, kiuj

¹ Ĉi tiu artikolo estas proponata samtempe al la liberecana bulteno *Interhelpo*, kiun redaktas Lukaso Wróbel. Ĝi traktas demandojn, kiujn Lukaso faris en la lasta numero de tiu bulteno.

volas kontakti kun ili. Se eblas ellabori iajn "gvidliniojn", tiam pri la Esperanto-informado de SAT kaj aliaj grupoj de maldekstraj esperantistoj. Eblas almenaŭ interkonsiliĝi por ekscii, kioma komuneco de opinioj pri la informa strategio ekzistas. Jen mia propono:

- La informado estu pli kleriga ol varba. Ĝi traktu socilingvistikajn kaj lingvopolitikajn demandojn inteligente. Per tio ĝi pli servu la revolucion movadon kaj malpli servigu ĝin al si kiel minejon de hommaterialo por Esperanto.
- La informado estu pli skrupule honesta ol ĝis nun. (Ekzemple, oni ĉesu aserti fantaziaĵojn pri "milionoj" da esperantistoj.)
- La informado liberiĝu de finvenkismo (imagoj pri ĝenerala enkonduko de Esperanto voje de parlamenta agado ktp.).
- La informado ne sugestu nerealisman perspektivon de "revolucia diglosio". Alivorte, ĝi ne sugestu, ke ĉiuj revoluciuloj aŭ maldekstruloj en la mondo interkomunikiĝu per Esperanto, dum la cetera mondo uzas tiucele alian lingvan sistemon.
- La informado priskribu la homkategoriojn, kiuj povus plej profiti de Esperanto, por ke la informatoj mem povu decidi surbaze de aŭtentika scio, ĉu lemi ĝin.

Gary Mickle, Berlino

77-a SAT-Kongreso en Bratislava (Slovakio)
2004-08-14/21

Org. KAVA-PECH, Anglika 878, CZ-25229 Dobrichovice
Tel:+420 257 712 201 faks:+420 257 712 126

rete:

Kongreskotizoj: (ĝis 30.08.04) ne membro de SAT - 45 €
(pli poste) 50 € - infanoj ĝis 10j ne pagas kotizon
SAT-membroj inv. legi la tarifon en SENNACIULO

Ni ricevis n-ro'n 3 (junio '04) de la SLEA INFORMILO kaj legis tre interesan tekston de E. Borsboom. La ekesto de "Plena Vortaro de Esperanto" Ĉar nia informilo 7 jam estas ekspedita, aperigos la artikolo, kiu estas je ĉiu tempo leginda, en la eldono 8 en oktobro.

La Socialisto

Filo de Esperantisto fariĝos ŝtata prezidento de Aŭstrio.

La 25an de aprilo 2004 la aŭstria popolo elektis la federacian prezidenton por la venontaj ses jaroj. En Aŭstrio la ŝtatestro estas elektata de la popolo. Kandidatis du konataj politikistoj:

la ministrino por eksteraj aferoj Benita Ferrero Waldner de la popolpartio (ÖVP – Österreichische Volkspartei) kaj

la dua prezidanto de la unua parlamenta ĉambro (Nationalrat) Heinz Fischer de la socialdemokrata partio (SPÖ – Sozialdemokratische Partei Österreichs).

Venkis Heinz Fischer, do ekde 18-jaroj denove socialdemokrato plenumos tiun altan oficon.



D-ro Heinz Fischer, venonta federacia prezidento de Aŭstrio kaj filo de esperantisto

Rimarkinde estas, ke Heinz Fischer estas la filo de Rudolf Fischer, matematikisto kaj liguisto, kiu estis esperantisto kaj membro de nia asocio ASLE jam delonge kaj ĝis sia morto.

Post la fama aŭstria federacia prezidento Franz Jonas, kiu, kiel konata, estis bonega espetantisto, nun denove homo el la sfero de Esperanto plenumas la plej altan oficon disponeblan en Aŭstrio.

R.K.

Sur la titola paĝo vi certe jam legis artikolon, origine skribita en germana lingvo de Rudolf Fischer, aperis en la retgazeto diePresse.com.

(Pri la enhavo de la ASLE-paĝoj respondecas Reinhold Kammler, (R.K.), Vieno.)

Fritz-Hüser-Instituto antaŭ novaj perspektivoj

La Fritz-Hüser-Instituto por germana kaj eksterlanda literaturo de la urbo Dortmund (Germanio) ne plu estas nekonata nocio en Germanio. Plurfoje prezentiĝis la instituto sian ekspozicion pri la Laborista Esperanto-Movado ĉe internaciaj kongresoj kaj multfoje menciis internacian gazeton de Esperanto.

La multjara gvidanto, profesoro dro. Rainer Noltenius, emeritiĝis lastdecembre post preskaŭ 25-jara agado, okazo por reĝardi la historion kaj evoluon de la instituto kaj, ankaŭ rigardi la novajn perspektivojn estontajn.

La fondon de la instituto kaŭzis la privata kolektado de laborista literaturo de Fritz Hüser (1908-1979), iama metallaboristo, kiu jam ek de sia juneco interesiĝis pri tia literaturo. Post la unua mondmilito fariĝis Fritz Hüser bibliotekisto kaj direktoro de la bibliotekoj en Dortmund. La urbo baldaŭ ekkonis la gravecon de la kolekto de Fritz Hüser kaj fondis en la jaro 1973 apartan instituton, kiun Hüser estris ĝis sia morto en 1979.

Rainer Noltenius fariĝis la nova estro kaj saĝe decidis, plivastigi la kampon je laborista kulturo ĝenerale. Multege da nova materialo estis (*kaj ankoraŭ estas*) kolektigata. Mi nur priskribu la Esperanto-sekcion.

Pluraj esperantaĵoj jam troviĝis en la kolektado de Hüser i.a. jarkolektoj de *Der Arbeiter-Esperantist/La laborista Esperantisto*. Fine dank'al la ampleksa donaco de la laboristo Eduard Weichmann+, Dortmund, (*siatempo i.a. ankaŭ prezidanto de LEAG*), la kolekto ricevis solidan bazon.

Eduard Weichmann interesiĝis pri la historio kaj nuntempo de la laborista Esperanto-movado ĝenerale, ligis kontakton kun la instituto kaj interesiĝis Noltenius pri tio. Noltenius siaflanke instigis nian kamaradon koncepti ekspozicion pri la temo. Komence de la okdekaj jaroj tiu ekspozicio estas montrita en pluraj germanaj urboj. Eduard Weichmann testamentis sian kolekton al la instituto, kiu tiam post lia morto 1988 transiris en la instituta posedo. En la 90-aj jaroj la ekspozicio – en prilaborita aspekto – estis prezentata en Valencio, Seul, Tokio, Osako, Tampere kaj Parizo.

La ekspozicio instigis esperantistojn kaj ne-esperantistojn, kiuj konservadis esperantaĵojn ekz. el la kolektadoj de la geavoj pri la laborista Esperanto-movado, donaci tian materialon al la instituto. Ĝi ricevis ampleksajn kolektadojn de gazetoj, libroj, fotoj, leteroj, standardoj, insignoj k.a. pri la germana kaj la internaciaj laboristaj Esperanto-movadoj.

La 18-an de decembro 2003 okazis oficiala adiaŭo de Rainer Noltenius. Rezentantoj de la urbo Dortmund aprezis lian laboron, emfazis la signifon kaj gravecon de la instituto por la dokumentado kaj esplorado de ofte negletata laborista kulturo kaj esprimis la pretecon de daŭra financa subteno. Por ke ankaŭ la scienca kaj esplora agado estu

garantiataj, estis subskribata kontrakto pri la kunlaboro kun la universitato de Dortmund. Tio malfermos novajn perspektivojn por la instituto.

Sub la titolo *Kulturo kiel fenestro al pli bona vivo kaj laboro* estas eldonita en germana lingvo ampleksa libro, memorigante al la aktiveco de Rainer Noltenius, kun pli ol 30 kontribuoj pri la laborista kulturo en la fakoj literaturo, arto, muziko, teatro kaj filmo. Pri *Tradicioj de la Germana Laborista Esperanto-movado (1911-1933)* kaj ĝia rolo en la Esperanto-ligo en la kultura ligo de la siatempa GDR(DDR) kontribuis Detlev Blanke, Berlin. La libro estas havebla en la germanaj librovendejoj (ISBN 3-89528-443-2)

Krom tio estas haveblaj ĉe la Fritz-Hüser-Institut der Stadt Dortmund, Ostwall 64, DE-44122 Dortmund:

Espozicia Katalogo de la Laborista Esperanto-Movado 5 €, serio de ok bildpoŝtkartoj kun E-motivoj 4 €.

Detaloj pri ekspozicioj liveras la instituto.

Donacoj de dokumentoj pri la laborista E-movado estas ĉiam bonvenaj.

Jiri Proskovec

Protesto! En la Informilo 6 aperis poemon de Christian Morgenstern en Esperanto kaj germanlingve. La ensendanto kaj tradukisto Manfred Retzlaff konstatis kelkajn erarojn, li skribis sub la dato 30.03.2004:

En la Esperanto-teksto:

1: post la unua linio de de la unua strofo mi metis punktokomon, ĉar mi volis apartigi la venontan frazon '*timiga estas tio ĉi*', kiu estas iom nedependa frazo;

2: en la unua linio de la dua frazo mankas la apostrofo fine de la vorto *rempar*;

3: fine de la dua linio de la dua frazo mankas la punktokomo post la vortoj *ĉie ĉie*;

4: fine de la kvina linio de la dua strofo mankas ankaŭ la fina punktokomo post la vorto *mar*;

5: en la unua lineo de la tria strofo oni dcevos anstataŭigi la vorton *ĉie per ĉio*.

En la germana teksto:

1: en la unua linio de la unua strofo la vorto *weisser* devas teksti *weiter*. (Krome „weiser“ devas esti skribita 'weißer' laŭ la nova germana ortografio);

2: fine de la dua linio de la unua strofo devus esti tajpata semikolo (punktokomo);

3: la unua linio de la dua strofo devas teksti: *O horch, nun bricht des Eises Wall*, sen 'h' post 'O' kaj sen punkto post 'Oh';

4: en la dua linio de la dua strofo la vorto 'alle' devas teksti ĝuste 'allen'.

Venontfoje la redakcio uzos simple la tekstojn el la diskedo. Kamarado Retzlaff bv. pardoni la erarojn.

AFS

Esperanto – kurz gefasst

(Fortsetzung – daŭrige)

Wortbildung: Bei den meisten Wörtern kann durch Austausch von Endungen aus einer Wortart eine andere gebildet werden:

skribi = schreiben - skribo = Schrift
 homo = Mensch - homa = menschlich
 afabla = freundlich - afable = freundlicherweise

Wortzusammensetzungen

werden ähnlich wie im Deutschen gebildet, wobei der Wohlklang maßgebend ist:

ĉambro + pordo = ĉambropordo (Zimmertür)
 domo + pordo = dompordo (Haustür) > das o in pordo entfällt.

Mit Hilfe von Wortbildungssilben, die ihrer Bedeutung nach fast umrissen sind, könne Tausende verwandter Begriffe gebildet werden:

Vorsilben und ihre Bedeutung

bo- Verwandtschaft durch Heirat frato = Bruder, bofrato = Schwager;
 dis- zer-, auseinander z.B. tranĉi schneiden, distranĉi zerschneiden;
 ek- beginnende Handlung z.B. dormi schlafen, ekdormi einschlafen
 eks- ehemalig z.B. eksreĝo Exkönig
 fi- moralisch verächtlich fihomo Lump
 ge- beide Geschlechter patro Vater gepatroj Eltern
 mal- Gegenteil fermi schliessen, malfermi öffnen
 mis- falsch, irrig misuzi missbrauchen misiri sich verlaufen;
 pra- Ur- Vor- homo Mensch prahomo Urmensch
 tempo Zeit pratempo Vorzeit
 re- wieder-, zurück doni geben redoni wiedergeben
 vidi sehen revidi wiedersehen
 Ĝis revido – Auf Wiedersehen

(Nächste Lektion in Informilo 8)

* * *

Leginte en Ĝangalo per interreto

Ĉu Esperanto oficiala lingvo ĉe olimpikoj?

La prezidantaroj de UEA,, Itala Esperanto-Federacio kaj Torina Esperanto-Centro skribis leteron pro-ponante, inter alie, la utiligon de Esperanto kiel oficiala lingvo por la vintraj olimpikaj ludoj, okazante en Torino dum la jaro 2006. La letero estis sendita al ĉefaj politikaj instancoj, kiuj nuntempe kunordigas la organizadon de la ludoj. La propono bazigas sur la konsidero ke la valoroj de paco, frateco kaj solidareco inter popoloj estas komuna grundo inter olimpikaj ludoj kaj Esperantomovado.

Oni povas ja esti iom skeptika pri la efektiva rezulto de tiu letero, pro la tro evidenta sinteno de la internacia komitato, kiu organizas olimpikojn, favore

al la angla. La iniciato laŭdindas tamen, se ĝi estos rigardata kiel komenco de multjara laboro por la oficiala enkonduko de Esperanto en la olimpikojn.



* * *

Traduko de la teksto sur paĝo 1:

Lingvistika verkego – tro malmulte notita

Estis unu de la revoj de la homoj, faligi la lingvobarierojn, por per lingva interkompreno pli bone kompreni la vivon de la alia. El la lingvokoncepto de L.L. Zamenhof oni sukcesis, fari realan lingvon el kreaĵo, kiu post ĝia uzo en ĉiuj situacioj de la vivo pruviĝis taŭga.

Ne konsiderinde estas, ke Esperanto ĝis nun estas ellernata kaj uzata nur sur bazoj de idealismaj aŭ sciencaj motivoj. Pro naciisma kaj lingvopolitika malvasta spirito la lingvo ne kulpas. Same ne pri manko de komprenemo de tiuj, kiuj ĝuste insistas pri konservo de kultura varieco kaj identeco kaj pro tio opinias, ke Esperanto estas la kontraŭulo, kvankam ĝi estas la plej bona aliancano. Ĉar la lingvo-barieroj ne estu – dum moderna regiona identeco en Eŭropo – faligataj sed nur ankoraŭ transportataj kaj tio en justa maniero por ĉiuj, per la sama peno.

Ke ĵurnalistoj kiel sinjoro Dr.Katscher (*en Vieno. Red.*) tion ne povas superrigardi nek laŭ objekto nek fake ĉiam denove eblas. Sen propra praktika sperto oni lingvon ne povas prijuĝi kaj ne iam kondamni. La normiga forto de la fakto favoras en nuna epoko la anglan lingvon kiel mondlingvon. Oni ne atendas ĉe tio, ke spite de multjaraj klopodoj kaj la parenceco al la germana lingvo, la edukado al la dua lingvo, la angla, ne sukcesis.

(AFS/H.R.)

* * *

Jubileo – 2006

En tiu jaro Libera Esperanto-Asocio estos 50 ! Ni intencas eldoni broŝuron pri la ekesto de la asocio kaj la okazaĵoj en la paso de la jaroj. Por bone ellabori la verkon ni bezonas dokumentojn, fotojn, tekstojn k.a.

Kiu el vi, karaj ĝeamikoj, ankoraŭ posedas tiajn dokumentojn ? Bv. ne heziti sendi ilin al Albert Stephan, Renchener Str.47, (DE) 77704 Oberkirch Post kopio tuj redonu! Dankon